



Svisa Esperanto-Societo

# informas

jaro 2012 numero 4-a: novembro-decembro 2012

dissendo je la 1-a de novembro



Fotis Claude Gacond

**La Svisa Esperanto-Koruso estrata de Elisabeth de Mestral kaj pianie akompanata de Lorris Sevonkhian dum la festa koncerto de la 1-a de septembro en la bela Salono Charles Faller de la Konservatorio de La Chaux-de-Fonds.**

# Rememorigilo

## *SES informas*

### Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils 14,  
CH-2300 La Chaux-de-Fonds  
Retpoŝto : gacond@bluewin.ch  
Tel. : hejme: 032 926 52 32  
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:  
Nancy Fontannaz, Stefano Keller,  
Richard Schneller.

## Redaktaj datlimoj

**2013-1 : januaro-februaro :**  
decembre 15, dissendo 10-an de januaro.  
**2013-2 : marto-junio :**  
febuare 10, dissendo 1-an de marto.  
**2013-3 : julio-oktobro :**  
julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.  
**2013-4 : novembro-decembro :**  
oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.

## Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

## SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue  
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj  
079 69 709 66.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.  
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto :  
[info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch)

Stefano Keller, sekretario, CP 6034, 1002  
Lausanne. Tel.: 076 261 06 09. Retpoŝto:  
kellerstefano@gmail.com

Marie-Louise Münger, Rue Centrale 4, 2112  
Môtiers. Tel. : 032 861 26 28.

Retpoŝto : ml.munger@bluewin.ch

Nelida Weidmann González, respondeca por  
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,  
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

### ***Kontonumeroj de SES (POSTFINANCE)***

**Svisa Esperanto-Societo**  
**2300 La Chaux-de-Fonds**

**Ĉefa konto 17-581908-4**  
(por kotizoj kaj donacoj)

**VASTE kaj DIGNE 12-128564-4**  
(por subteni informadon-varbadon)

Komisiito pri financoj : Hans-Werner  
Grossmann, Esperanto-Servo, PF 262, 4132  
MuttENZ. Tel. : 076 460 89 92.

Retpoŝto: [esperanto-servo@bluewin.ch](mailto:esperanto-servo@bluewin.ch)

**Konsultu la retejon de SES !**

[www.svisa-esperanto-societo.ch](http://www.svisa-esperanto-societo.ch)



# Vivo de SES

2012-4 • Redaktis : Claude Gacond



## **Festado de la 125a jariĝo de esperanto je la sabato 1-a de septembro en La Chaux-de-Fonds**

Trideko da esperantistoj el Svislando, Germanio kaj Francio iom tro premitaj ĉeestis la matenan parton de la festo okazinta en la CDELI-salono, kaj ne kiel antaŭvidite en la aŭla salono, tio pro neantaŭvidita malvarmiĝinta vetero. Kaj la senĉesa pluvego malhelpis konvenan grupiĝon ĉe la strato *Rue Neuve 16* antaŭ la domo de la horloĝisto Philidor Wolf, tre verŝajne la unua esperantisto de Svislando, kies filo Jules naskiĝinta en 1887 certe estis la unua denaska esperantisto de Svislando. Sed malgraŭ tio la tuta festa aranĝo bone sukcesis, kiel atestas entuziasma raporto aperinta en la franca bulteno *La Sago* de SAT-Amikaro.

Matene, post rapida kunsida momento celinta plibonigi la statutan projekton de la asocio de la Amikaro de CDELI, vere grandan intereson vekis la prelegoj de d-ro Christoph Klawe pri la romano *Kiel akvo de l' rivero* de Raymond Schwartz kaj de Dominique de Mestral pri la poemaro *La infana Raso* de William Auld. Tial unuanime esprimiĝis deziro, ke la *Kulturaj paĝoj* de nia bulteno detale raportu pri ambaŭ kontribuadoj. Ĉar ambaŭ prelegintoj akceptis pozitive respondi al tiu ĝenerala peto, jam ĉi-bultene eklegiĝas iliaj valoraj kontribuoj.

La posttagmeza programo disvolviĝis en la bela Salono Charles Faller de la Konservatorio. La spektaklon karakterizis du aparte impresigaj momentoj. Kiel montras la fotoj de la malantaŭa kovrilpaĝo, unue skeĉis la gelernantoj de La Granda Ursino pri la 125a jaro de Esperanto antaŭ la transdono de diplomo al la sukcesintoj de la Tutmonda Lingvo-ekzameno okazinta la 9an de junio en la CDELI-salono. Ambaŭ momentojn talente estris Monika Molnar antaŭ duobligita publiko, la aŭskultontoj de la koncerto kaj la gepatroj kaj amikoj de la gelernantoj de la Granda Ursino.

Post tiu vivoplena momento vigle aplaŭdita, la gepatroj fiere forlasantaj la salonon kun siaj gefiloj, kaj ankaŭ la esperantista aŭdantaro, esprimis la deziron povi legi tiun skeĉon, kiun la grand-ursanoj titolis *Ludi per ĉiuj klavoj* aŭ franclingve *Faire flèche de tout bois*, kiu vekis ridojn kaj aplaŭdojn de la

aŭskultantaro. Ĝi estis fakte improvizita kaj ekzercita de la grand-ursanoj dum migrada semajno en Ĵuraso ĵus okazinta ĝis la hieraŭa vendredo.

Jen do la sprita skeĉo kun la nomoj de la parolintoj :

### **Ludi per ĉiuj klavoj / Faire flèche de tout bois**

- Juliette/Ch.- Saluton !
- Quentin.- Sal !
- Sinan.- Saluton !
- Nassim.- Beh, jen ni denove en la lernejo.
- Hugo.- La ferioj estas pli kaj pli mallongaj !
- Nina.- Jes ! Ankaŭ mi pensas tion !
- Laura.- Kiu estos la unua leciono ?
- Sinan.- Mi ne scias, mi ne rigardis la horaron.
- Jonathan.- Ne gravas, sinjorino Lidja jam antaŭpreparis la materialojn, ni rigardu iomete, kio estas.
- Lucas.- Rigardu, estas mapo ! Mi pensas, ke ni havos geografion.
- Malou.- Ne! Rigardu ! Ĉi tie estas ciferoj. Mi pensas, ke ni havos matematikon.
- Louis.- Ho, ne! Komenci per matematiko estus tro kruela.
- Mattias.- Mi ne pensas, ke estos matematiko.
- Alain.- Kial?
- Mattias.- Ĉar estas nur kvar ciferoj. Tro malmulte por matematiko.
- Louis.- Por mi eĉ tri estas jam tro...
- Quentin.- Kion oni povas fari per kvar ciferoj?
- Malou.- Por telefonnumero ne sufiĉas.
- Julette.- Ĉu eble temas pri iu dato ?
- Nina.- Jes! Certe ! Do ni havos historion.
- Jonathan.- Se ni scios jam ĉion antaŭ ol la instruistino demandos nin, eble ni havos paŭzon pli rapide !
- Mattias.- Jes ! Bonega ideo, ni rigardu la ciferojn, pri kiu dato temas ?
- Alain.- 8871 (okmil-okcent-sepdek-unu) !
- Lucas.- Ho, jes, kaj ni parolos pri eksterteranoj, kiuj vizitos nin.
- Hugo.- Aŭ eble pri la homa vivo sur Marso...
- Laura.- Estu pli seriozaj ! La unua cifero certe estas la 1. Sed kio poste ?
- Quentin.- Eble 1788 (mil-sepcent-okdek-ok).
- Nassim.- Mi ne scias, sed eble ni trovos helpon en tiu ĉi enciklopedio. Ni vidu !
- Laura.- En Aŭstrio Wolfgang Amadeus Mozart komponis 3 simfoniojn en malpli ol 2 monatoj !
- Malou.- Ankaŭ Joseph Haydn komponis 2 simfoniojn.
- Lucas.- Oni ekkonstruis la Brandeburgan Pordon en Berlino.
- Hugo.- Oni fondis la bierejon Cardinal en Fribourg.
- Chiara.- Ho jes, certe pri tio ni lernos detale...

Alain.- En Usono ekvalidis la Konstitucio.  
 Juliette.- Ĉu io alia ?  
 Jonathan.- La Chaux-de-Fonds fariĝas pli kaj pli granda pro la horloĝ-industrio, sed se ne... mi ne trovas multon pri tiu dato.  
 Mattias.- Eble ni rigardas ne la ĝustan daton. Eble temas pri 1878 (milkcent-sepdek-ok).  
 Alain.- Bone, ni vidu, kio okazis tiam.  
 Nassim.- En Ameriko Thomas Edison inventis la ampolon kaj en la sama jaro la unua magazeno jam uzis ĝin.  
 Malou.- Ankaŭ en Parizo aperis la unua elektra lumigo.  
 Chiara.- Same en Parizo naskiĝis André Citroën.  
 Laura.- Kaj kiu naskiĝis ankoraŭ en tiu jaro ? Mi helpas : li naskiĝis en La Chaux-de-Fonds kaj ankaŭ li donis sian nomon al aŭtomarko.  
 Hugo.- Louis !  
 Louis.- Kio ? Kial mi ? Kion mi faris ?  
 Hugo.- Vi? Vi endormiĝis. Ni parolas pri alia Louis, kiu konstruis aŭtomobilojn.  
 Louis.- Ah ! Vi parolas pri Louis Chevrolet ? Diru tion tuj anstataŭ timigi min.  
 Sinan.- Pst ! Ŝi alvenas ! Iru al via loko.  
 ĈIUJ.- Saluton Sinjorino Lidja !  
 Clémentine.- Saluton al vi ĉiuj ! Mi esperas, ke vi havis belajn feriojn kaj vi estas pretaj por novaj aventuroj.  

*La tuta klaso murmuris, paroletas.*

 Clémentine.- Hodiaŭ mi parolos pri ...  
 Hugo.- La bierejo en Fribourg !  

*Ĉiuj ridetas.*

 Alain.- La konstitucio en Usono !  
 Nassim.- Thomas Edison kaj la unua elektra ampolo !  
 Laura.- Wolfgang Amadeus Mozart !  
 Malou.- Joseph Haydn !  
 Chiara.- André Citroën !  
 Louis.- Louis Chevrolet !  
 Clémentine.- Ho, vi estas tre motivitaj ! Bonege ! Mi ŝatas tion. Sed kial vi pensas pri tiuj ĉi eventoj aŭ pri tiuj ĉi homoj ?  
 Nassim.- Beh... ĉu ne temas pri 1788 aŭ pri 1878 ?  
 Clémentine.- Vi estas tre ruzaj, sed mankas ankoraŭ unu dato en via ciferkombino. Temas pri la jaro 1887 !  
 Jonathan.- Ho, ĉiuj niaj serĉoj estis vanaj ! Ni povas ĉion rekomenci.  

*3-4 en la lastaj vicoj serĉas en la libro.*

 Clémentine.- Do, temas pri 1887. Ĉu iu havas ideon pri tiu ĉi jaro ? Ĉu iu scias, kio okazis tiam ?

Quentin.- En Usono naskiĝis... (*serças, serças*)... Koka-Kolao !  
 Clémentine.- Kvankam tio veras, ni tamen ne iros al tiu parto de la mapo. Provu alian kontinenton.  
 Juliette.- Gandhi forlasis Indion por studi juron kaj helpi la aliajn.  
 Clémentine.- Bona provo, sed revenu al nia kontinento, al Eŭropo. Kio okazis tie en 1887 ?  
 Sinan.- Oni ekkonstruis la turon Eiffel en Parizo !  
 Lucas.- Oni festis la alvenon de la akvo en La Chaux-de-Fonds ! Ĝi alvenis ĉi tien, al 1000 metroj el la rivero Areuse !  
 Clémentine.- Bone ! Vi scias multon jam, sed vi ankoraŭ ne trovis nian hodiaŭan temon. Temas pri iu homo, kiu...  
 Nassim.- Numa Droz ! Kiu prezidis la svisan konfederacion !  
 Clémentine.- Ne. Temas pri homo, kiu konstruis...  
 Hugo.- Le Corbusier ! Kiu naskiĝis en La Chaux-de-Fonds en 1887 kaj konstruis domojn !  
 Clémentine.- Ne. Temas pri homo, kiu skribis...  
 Jonathan.- Blaise Cendrars ! Kiu naskiĝis en La Chaux-de-Fonds en 1887 kaj skribis verkojn !  
 Clémentine.- Ne, ne. Mi helpas iomete vin. Ĉu la evento okazis en Eŭropo ? Jes. Ĉu en Svislando ? Ne. Ĉu temas pri naskiĝo ? Jes. Ĉu naskiĝo de homo ? Ne. Tamen, se vi trovas la homon, tio multe helpos vin.  
 Lucas.- Ĉu vi povus helpi iomete por trovi la nomon de tiu persono ?  
 Clémentine.- Jes. Se mi diras lian nomon en la franca, ĝi estas Louis.  
 Louis.- Kio ? Kial mi ? Kion mi faris denove ? Sed ni jam trovis lin : Louis Chevrolet !  
 Mattias.- Vekiĝu Louis kaj helpu nin. Vi ĉiam revadas. Ni serĉas homon, kies nomo en la franca estus Louis.  
 Louis.- Sed ni jam trovis lin : Louis Chevrolet !  
 Quentin.- Ho, vi ne aŭskultis, ne li, ne temas pri sviso.  
 Laura.- Louis...Louis...Louis van Beethoven !  
 Clémentine.- Ne, ne li, sed lia vera nomo donas novan indicon.  
 Malou.- Ludwig van Beethoven. Ludwig... Ludwig...  
 Juliette.- Ludoviko.  
 Nina.- Ĉu Ludoviko Ariosto, la itala poeto ?  
 Clémentine.- Ludoviko-jes. Itala-ne. Lia loĝloko troviĝis en la hodiaŭa Pollando. Do, kiu li estas ?  

*Silento.*

 Clémentine.- Ho, eble la ferioj estis tro longaj ! Vi estas nepoj kaj nepinoj de grandaj homoj. Pensu pri viaj nomoj kaj diru al mi, kiu kunigis viajn prapatrojn ? Grabowski, Hodler, Seppik, Privat... aŭ vi, Schwartz ? Ĉu vere vi ne havas ideon ?  
 Lucas.- Se vi pensis pri Ludoviko Zamenhof...

- Clémentine.- Jes ! Certe ke mi pensis pri li. Kial daŭris tiom longe por trovi lin?
- Quentin.- Ĉar estis tro facila ! Ni serĉis lin tro malproksime.
- Alain.- Ni konsultis eĉ enciklopedion !
- Clémentine.- Do, diru al mi, kion vi scias pri 1887 kaj Zamenhof ?
- Jonathan.- En la somero 1887 Zamenhof eldonis la Unuan Libron.
- Mattias.- Fakte temis pri broŝuro, kies nomo estis « La Unua Libro ».
- Hugo.- Li sendis ĝin al pluraj urboj de pluraj landoj.
- Lucas.- Ĝi alvenis ankaŭ al La Chaux-de-Fonds, en la sinagogon.
- Nassim.- Philidor Wolf, horloĝ-fabrikisto lernis ĝin.
- Malou.- Verŝajne li estis la unua esperantisto en Svislando.
- Laura.- Kaj lia filo, Jules, la unua denaska esperantisto en Svislando.
- Louis.- Ankaŭ la horloĝ-marko „Movado“ venas el tiu periodo.
- Quentin.- Ĉu bone tiel ?
- Sinan.- Ĉu ni povas havi la paŭzon ?
- Nina.- Ni meritas ĝin, ni vere multe laboris.
- Clémentine.- Jes, en ordo, sed antaŭe iu kalkulu por mi ankoraŭ tion, kiom jara estas nun Esperanto, se ĝis naskiĝis en 1887 ?
- Louis.- Jes! Mi sciis, ke finfine tamen estos iu kaŝita matematiko en la afero!
- Juliette.- Cent ...
- Chiara.- ... dudek ...
- Juliette.- ... kvin !
- Alain.- Paŭzo !
- ĈIUJ.- Bonan naskiĝtagon Esperanto !
- ĈIUJ.- Ĝiiis !!!

*Ĉiuj forkuras.*

Sed la skeĉintoj devis reveni scenejen responde al la entuziasma aplaŭdado de la publiko.

### **Gratulo al la ekzamen-sukcesintoj**

La transdono de diplomo laŭ la diversaj ekzamen-niveleoj al la sukcesintoj de la **Tutmonda Lingvo-ekzameno**, fare de Monika Molnar, tuj sekvis la skeĉan eventon. Indas mencii, ke inter tiuj sukcesintoj nombriĝas ne nur tri gelernantoj de La Granda Ursino : Jonathan Gamez el Colombier, Paule Cubeddu kaj Elena Baehler el La Chaux-de-Fonds, sed ankaŭ ilia instruistino Anke Brouwer el La Chaux-du-Milieu.

La aliaj sukcesintoj de tiu ekzamena sesio okazinta la 9an de junio estas Gabriel Marchon el Corminboeuf, Emmanuel Desbrières el Besain (Francio), Nancy Fontannaz el Pully, André Sandoz el La Chaux-de-Fonds, Adrian Tanner el Dotzigen kaj Laurence Ducret Aïdonidis el Nyon. Tiu lasta bedaŭrinde ne

vicas sur la foto, kiu videblas sur la malantaŭa kovril-paĝo de la bulteno, ĉar ŝi ne povis ĉeesti la gratuladon.

La gelernantoj de la Granda Ursino, ĵus revenintaj malfrue la antaŭan tagon de sia migrado, estis tro lacaj por povi ĉeesti la muzikan programon. Tial la plimulto el ili kun siaj gepatroj iom post iom forlasis la salonon, kaj estis pli malvasta publiko, kiu travivis la koncerton, kvardeko da esperantistoj kaj sama nombro da neesperantistoj, grandparte konatoj kaj familianoj de Claude Gacond.

Fakte la definitivigo de la koncerta programo efektiviĝis nur dum la lasta antaŭa semajno, kvankam la tuta projekto jam lanĉiĝis en la printempo. Tial ne eblis vastskale informadi la muzikemulojn de La Chaux-de-Fonds.

Sed ĉiuj aŭskultintoj esperantlingvaj kaj ankaŭ nur franclingvaj entuziasmiĝis pri la kvalito de tiu koncerto. Ĉiuj aprezis la dulingvan programon, kiu entenis la parolojn de la kantaĵoj kun ties franclingva traduko, kiun ĉiuj alvenantoj ricevis. Tiu foliaro ne nur faciligis plenan komprenon de la kantaĵoj al ĉiuj, sed ankaŭ estis ŝatata de la franclingva publiko, kiu tiel povis ekĝui pri la poezieco kaj belsoneco de esperanto.



Fotis Claude Gacond.

La koncerto komenciĝis per originalaj poemoj de Julio Baghy titolitaj *Al mia kara kaj nobla Heleno*, muzikigitaj de Miĥaelo Sarosi. Plej multajn el ili Jean-Thierry von Büren kantis kun rimarkinda sentemo. Sed du el ili, kiuj tro altis por lia baritona voĉo, interpretis Elisabeth de Mestral.





Fotis Claude Gacond

Melodie tiu poemaro fakte respegulas la ciganecan devenon de la poeto Baghy, kiu ŝatis kante reciti siajn poemojn kun improvizita akompano de lia amiko Sarosi, kaj tiu hungara muzikisto poste zorgis pri ilia definitiva orkestrado.

Tiu originala poemaro, kiun Baghy fakte dediĉis al svisino, nun troviĝas en CDELI. Ĝi fakte estis eleganta komplemento al la matena prezento de verkoj de Schwartz kaj Auld. Tiel estis honorigitaj tri el la plej gravaj kaj signifaj esperanto-verkistoj.

Jen la titoloj de tiuj poemoj de Julio Baghy : *Lasta Letero. Arbara idilio. Serenado. Barkarolo. Valso. Vesperiĝas vagabondo* kaj *Ludas la cigano*, ambaŭ rememorantaj la ciganan devenon de Baghy, kaj fine *Vinon*, kiun bise reinterpretis Jean-Thierry von Büren responde al entuziasma aplaŭdado de la publiko.

La pianiston Lorris Sevonkhian estis ankaŭ vigle aplaŭdata pro sia talenta kaj nuancita akompanado de la kantistoj kaj koruso, kaj lia interluda interpreto de du studoj kaj nokturno de F. Chopin kaj de tokato de A. Khachaturian estis unu el la kulminaj momentoj de la koncerto.

Elisabeth de Mestral impresis ĉiujn, ne nur pro la spriteco kaj petoleco de sia interpreto de aro da francaj melodioj romantikaj kaj humuraj el la zamenhofa periodo (1879-1920), sed ankaŭ pro sia simpatia kaj lerta maniero gvidi la Svisan Esperanto-Koruson. Oni komprenas, kial el tuta Svislando regule alkuras

la kantemaj esperantistoj por ekzercaj renkontiĝoj, kies rezultoj montriĝas pli kaj pli signifaj.



Fotis Claude Gacond

Jen la francaj melodioj, kiujn ŝi interpretis laŭ esperantigo de sia edzo Dominique de Mestral, kun mencio de la franclingvaj originalaj titoloj : *Bela vespero / Beau soir*, de Claude Debussy. *Apud river' / Au bord de l'eau* de Gabriel Fauré. *Mandolino / Mandoline* de Claude Debussy. *Kanto malgaja / Chanson triste* de Henri Duparc. *La Vojoj de l'amo / Les Chemins de l'Amour* de Francis Poulenc. *La Knabinoj de Kadiks' / Les Filles de Cadix* de Leo Delibes. *Ebriiĝo / Griserie* de J. Offenbach el "*La Périchole*" kaj *La primadono de l'Empiro / La diva de l'Empire* de E. Satie. Ambaŭ lastajn kantojn ŝi tiel talente aktoris, ke la publiko aplaŭdege rekantigis ilin.

Jen la listo de la popolaj kantoj el diversaj devenoj, kiujn konklude al la koncerto entuziasme prezentis la korusanoj. *La belaj vilaĝoj* de Carlo Boller. *Ĉe Fonto kaj Tien trans arbar'*, du finnaj kantoj. *Vidu de monto kaj val'* de la alemano F. F. Huber. *Florbukedo*, tiĉina melodio. Kaj *Dormu vi* de la grizonano N. Vomoos. Konklude *Printempa fanfaro* de J. Bovet. Bela programo, ĉu ne !

Fine de la koncerto la muzikistoj kaj la publiko tiel entuziasmis, ke ambaŭe ili emis rekanti aŭ aplaŭde rekantigi diversajn melodiojn, plu daŭrigante la koncerton. Tiel malfacilis komprenigi al ĉiuj, ke tamen venis tempo forlasi la belan Salonon Charles Faller de la Konservatorio de La Chaux-de-Fonds. Jen

pruvo pri entuziasma kaj digna festado de la 125a naskiĝjaro de Esperanto, ĉu ne !



Fotis Claude Gacond.

-oOo-

## **Postsomera renkontiĝo. Sabate la 8an de septembro 2012**

Dinosaŭraj spuroj en Oberdorf (SO) kaj ŝipveturado de Soloturno al Bielo.

Unu semajnon post la ĉaŭdefona renkonto, al Soloturno Mireille Grosjean kunvenigis la migremajn esperantistojn. 14 personoj partoprenis tiun renkonton ĝuante pri belega vetero dum tiu fruaŭtuna tago.

Plian fojon Esperanto ludis ligan rolon inter personoj el Romanshorn kaj el Ĝenevo, kaj el plej diversaj aliaj lokoj de nia etega lando. Kunvenis aĝaj kaj junaj geesperantistoj en Soloturno kaj ili uzis trajneton por atingi la bazon de Ĵuraso. Post 40-minuta piedirado la grupo atingis balkonon, de kie vidiĝas la famaj spuroj de pratempaj bestegoj.

La posta etapo estis vizito de tiu mirinde bela urbo Soloturno, kiu enhavas multajn mezepokajn stratetojn kun allogaj butikoj. Orieloj kaj fontanoj altiras la okulojn kaj plezurigas la mensojn. Belaj arboj ornamas la bordojn de la rivero Aare.



Fotis Mireille Grosjean

Ĉe la kvinflanka turo la grupo enŝipiĝis kaj komenciĝis ripoziga veturado tra Altreu, kie vidiĝas cikonioj, tra Port, kie la ŝipo devas salti tri metrojn alten al la lago de Bielo per helpo de kluzo antaŭ ol atingi la bielan havenon.

Post mallonga promenado tra la urbo la grupo atingis la stacidomon kaj tie vizitis la atendejon, kie vidiĝas freskoj pentritaj de Philippe Robert, la avo de Mireille Grosjean.

Tiaj promenadaj renkontoj ĉiam samtempe donas eblon intimiĝi kun novaj pejzaĝoj kaj kun migremaj samideanoj. Bela praktikeblo de Esperanto. Espereble multiĝos tiaj lokaj renkontiĝoj kaj gratulon al la nepino de Philippe Robert, kiu iniciatis la septembran.

-oOo-

### **Atentu !**

La anoncita prelego de Privas Tchikpe el Benino anoncita por la 1-a de decembro en Bern ne okazos

# Pri la venonta Ĝenerala Asembleo 2013

La Ĝenerala Asembleo de SES okazos sabate la 23an de marto 2013  
**en Staat, oriente de Sankt Gallen**

Preciza rendevua loko :

**Hotelo Weisses Rössli**

**Hauptstrasse 69, 9422 Staat (SG). Tel: 071 855 15 15**

Ekde 10h00 : alveno, kafumado, babilado.

11h00 precize : Komenco de la Ĝenerala Asembleo.

12h30 : Komuna tag-manĝo antaŭmendenda.

## **Kultura programo** **Ĉe la Markthalle en Altenrhein**

Je la 15h00 ni ĝuos pri ĉiĉeronado tra tiu majstroverko : la **Markthalle** en **Altenrhein**. Temas pri bazaro-halo konstruita de la fama aŭstra artisto **Hundertwasser**. Tiurilate vidu fotojn tie :

<http://mirejo.blogspot.ch/2008/09/petit-voyage-en-suisse-alemanique.html>

La piedirado el la hotelo Weisses Rössli daŭras 10 minutojn laŭ ebena strato.

## **Konkurso**

Dum la vizito en la Markthalle ni havos la okulojn plenajn je viglaj koloroj. Pro tio SES organizas konkurson kun diversaj premioj. Temo :

Kiu venos al tiu evento vestita de **PLEJ BUNTAJ VESTOJ KUN VIGLAJ KOLOROJ ?**

Ĵurio decidus pri premioj : unua, dua, tria kaj lasta.

Anonco pri nia kunvena tago iros al Germana Esperanto-Asocio kaj Aŭstra Esperanto-Asocio, kun la espero, ke nia renkontiĝo estos internacia.

**Alveno** : la plej proksima publika transporto por atingi la Markthalle estas aviadilo kaj uzo de la flughaveno Altenrhein.

Tamen ankaŭ ekzistas busoj kaj trajno (linio Sankt Gallen - Rheineck - Sankt Margrethen) !

**Loĝado** : Ĉar la loko estas tute ne centra en Svislando, tial eblas tranokti en la hotelo Weisses Rössli en Staat kaj en la hotelo Hecht en Rheineck (tel 071 888 29 25) aŭ en aliaj tiaj establoj de la regiono.

La organizanto : Mireille Grosjean, kiu pretas respondi al eblaj demandoj.

-oOo-

## Donacoj ricevitaj de SES

Aebi Traugott Fr 5.-, Bornet Laure 15.-, Buhlmann David 40.-, Carlevaro Tazio 200.-; Carrier Danielle 15.-, Chaves-Walder Verena 25.-, Ducret Aïdonidis Laurence 30.-, Eisenegger Elisabeth 15.-, Grabowska Maria 10.-, Huguenin François 15.-, Huguenin Noël 60.-, Humbert-Fink Yvette 15.-, Nicolodi Anna-Lise 30.-, Pokorny Annemarie 15.-, Rivière Jimmy 15.-, Sandoz André 80.-, Tanner Adrian 30.-, van Pujenbroek Ruth 15.-, Weidmann Armin 15.-, Weidmann Didi + Nelida 100.-, Zoller Marie 20.-.

**Entute : Fr 765.-**

**Patronoj** : Carlevaro Tazio + Teresita, Ducret Aïdonidis Laurence, Goy Yvette, Hasler John, Nicolodi Anna-Lise, Ortelli Luciano, Tanner Adrian, Vigny Marc, Zoller Marie + Raymond.

**Ni kore dankas al la malavaraj donacintoj !**

**07.09.2012 H.W. Grossmann.**

-oOo-

### INTERKULTURA EDUKADO : BONA IDEO !!

En 2011 SES decidis partopreni en tuteŭropa projekto **Grundtvig** kun la temo « Interkultura Edukado, defio por Eŭropo ». Kunlaboro ekis inter Francio, Germanio, Katalunio kaj Svislando. La gvidfadeno de la Grundtvig-programo estas lerni dum la tuta vivo, do temas pri plenkreskula edukado.

Jam okazis diversaj renkontiĝoj en ĉiuj partoprenantaj ŝtatoj. Kiam svisoj veturas eksterlanden, iliaj vojaĝkostoj estas repagitaj, ĉar SES ricevis monon de Eŭropa Unio. Jam ok personoj de Svislando iris al Francio, Germanio kaj Katalunio.

La debatoj kaj aktivecoj ĉirkaŭ nia temo estas ege interesaj kaj fruktodonaj. La fina rezulto de nia dujara laboro estas retejo, kies adreso estas [www.noos.ch/ideo](http://www.noos.ch/ideo). Bonvolu viziti ĝin !!

Okazos aliaj renkontiĝoj, al kiuj vi povus partopreni !! Bonvolu noti kaj pripensi !

Jen la datoj :

14-15aj de decembro 2012 en Katalunio.

De la 8a ĝis la 11a de majo 2013 en Artigues, apud Bordojo, Francio.

Plia dato en 2013 : Katalunio.

Laŭ la regulo de tiu programo ni devas iri al eksterlando dekdufoje. Do jam ni atingas ok. Kvar pliaj personoj, aŭ la samaj, devas ankoraŭfoje partopreni staĝon en eksterlando. Post vizito al nia retejo [www.noos.ch/ideo](http://www.noos.ch/ideo) vi konstatos, ke ĝi estas en 5 lingvoj. Do tradukado necesas. Se vi havas la kapablon kaj la tempon, bonvolu anonci vin al mi. El la EU-mono venos ne salajro, sed dankmono por tiuj, kiuj tradukos.

Bonvolu ekrikti kun mi, se vi havas demandojn !

Mireille Grosjean, kun-prezidanto de SES.

## Anoncoj

### **Ekspozicio pri Esperanto en Berno En la turka restoracio Take Away ESPERANTO**

Winkelriedstrasse 42, 3014 Bern

#### **Invito al ĝia inaŭguro**

Dimanĉon 18an de novembro je la 17h00

Sinjorinoj Sonia Daubercies el Belmont kaj Charlotte Blanc Maillard el Vevey preparis tiun ekspozicion en 2012. Jam multaj homoj vidis ĝin en la butiko *Magasins du Monde* en Vevey, kaj la esperantistoj speciale kadre de la pasinta Ĝenerala Kunveno de SES. Ĝi konsistas el 22 paneloj, ĉiu kun portreto de persono kaj citaĵo de tio, kion li diris pri Esperanto. Tiuj tekstoj estas esperantigitaj. Inter tiuj personoj rimarkiĝas Leo Tolstoj, Albert Jacquard, Charlie Chaplin, Robert Kennedy, la papoj Johano XXIII kaj Paŭlo VI, Auguste Forel, Gustave Eiffel, Léon Lumière kaj ceteraj.

La vizitantoj ricevas tiujn citaĵojn en la franca aŭ germana aŭ turka lingvoj kaj devas klopodi parigi ilin kun la panelaj citaĵoj, tio estas fakte diveni, kiu frazo kongruas kun la panela frazo en Esperanto. Tiel ili konstatas la facilecon de Esperanto.

Bonvolu informi viajn konatojn en la Berna regiono pri tiu ekspozicio vizitebla ĝis la mezo de decembro. **Kaj koran inviton al la inaŭguro.**

### **Pri la venontaj studsabatoj en CDELI Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds**

Strato Progrès 33, 2303 La Chaux-de-Fonds.

Buso N° 4 direkto Hôpital, haltejo Bibliothèque.

Jen la datoj de la venontaj studsabatoj : Novembre 17, decembre 15, 2013  
januare 26, februare 16, marte 16, aprile 20, majo 25 kaj junio 15.

Formiĝas 3 studrondoj laŭ la lingvo-niveletoj : tutkomencantoj, mezuloj kaj lertuloj. Partoprenkontribuo : Fr 15.- (senpage por la studentoj kaj senlaboruloj).

#### **La decembra studsabato disvolviĝos en festa etoso.**

Studhoraro : Malfermo : 10h00. Studo ekde 10h30. Komuna tagmanĝo : 12h45.

Plia studo : 14h15. Konkludo : 16h30. Oficiala fermo : 17h30.

Surloke aĉeteblas libroj novaj kaj brokantaj.

Por aliĝi aŭ ricevi disdoneblajn informilojn kontaktu Nancy Fontannaz, ĉu rete : [nancy.fontannaz@gmail.com](mailto:nancy.fontannaz@gmail.com), ĉu telefone : 021 728 31 27 (kun respondilo) ne forgesante indiki viajn nomon kaj adreson.

## Amikeca gesto



Piere-Yves Tissot kaj Mireille Grosjean

Hans-Christian Andersen, la fama dana poeto, vivis modeste en sia lando. Okazis, ke li iris al la kortumo de la reĝo por trovi en la ĝardenoj kaj salonoj kelkajn manĝaĵojn dum bufedoj kaj kokteloj. Tie li renkontis Sinjoron Houriet el Le Locle. Tiu horloĝfaristo estis irinta al Kopenhago por ripari la horloĝojn de la dana reĝo. Ambaŭ viroj amikiĝis kaj Houriet invitis Andersen al sia domo en Le Locle, ĉe Crêt-Vaillant 28. Tie nuntempe vidiĝas memortabulo indikanta : *"Ici vécut Hans-Christian Andersen, poète et conteur danois"* (Ĉi tie vivis Hans-Christian Andersen, dana poeto kaj fabelisto).

La poeto verkis en Le Locle kaj mi sukcesis obteni la enhavon de la fabelo *Anjete kaj la Tritono* pere de kontaktoj kun danaj esperantistoj. Strato en la orienta parto de la urbo Le Locle nomiĝas Strato Andersen. En la horloĝmuzeo de Le Locle sidas la horloĝisto Houriet (homgranda marioneto aŭtomata), kiu rakontas pri siaj kontaktoj kun Andersen.

En Le Locle estas urba biblioteko, kies direktoro, Sinjoro Pierre-Yves Tissot, antaŭe laboris en La Chaux-de-Fonds, kie li interalie deĵoris kiel bibliotekisto de CDELI. Li do bone konas Esperanton kaj favoras al ĝi.

La fabeloj de Andersen ekzistas en Esperanto kaj elstaras pro la fakto, ke Zamenhof mem tradukis ilin al sia lingvo.

Pro tio mi aĉetis la fabelojn de Andersen en Esperanto kaj iris donaci la libron al la urba biblioteko en Le Locle. Interese estas, ke la libro estas elĉerpita en la libroservo de UEA en Roterdamo kaj ke mi trovis ĝin kaj venigis ĝin el Tokyo.

Mireille Grosjean



## Universala Esperanto-Asocio

UEA estas la tegmenta organizo de Esperanto en la mondo. Ĝi nun havas 70 landajn asociojn. Kaj ĝi funkciigas mirindan sistemon : temas pri la delegita reto.

Tiu reto kaj ties membroj servis kaj servas en diversaj agadoj kaj kampoj. Nepre ni memoru, ke la Ruĝa Kruco uzis tiun servon en la jaro 1918, kiam ĝi devis trovi filon, patron, patrinon, en vunda Eŭropo fine de la unua mondmilito. Tiam delegitoj de UEA skribis 180 000 leterojn tra la landoj de Eŭropo klopodante trovi la membrojn de la disŝiritaj familioj. Pri tio mi informiĝis en la arkivejo de la Ruĝa Kruco en Ĝenevo, tamen tie ne troviĝas spuroj de tiu efika helpservo. Tie oni respondis al mi, ke la spuroj eble troviĝas en la diversaj sekcioj de la Ruĝa Kruco en la koncernaj landoj.

Kiel delegito ekde 1990, se mi bone memoras, mi devis respondi al tri petoj. Do ne temas pri tro granda laboro.

Mi forte sugestas al vi ĉiuj fariĝi delegito de UEA. Vi povas indiki vian profesion kaj/aŭ vian ŝatokupon. Ekzistas klara regularo, neniuj ĝenos vin per strangaj demandoj aŭ monpetoj.

Nuntempe ekzistas 18 delegitoj en Svislando laŭ la Jarlibro 2011 de UEA.

Mireille Grosjean

## CDELI certe indas je financa apogo

Kiel aldonaĵo al tiu finjara kajero de *SES informas* troviĝas help-alvoko al CDELI. Espereble multaj pozitive respondos al ĝi.


La Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia fakte plenumas sian gravan publikan interlingvistikan funkcion multifacetan dank'al duobla apogo :

a) Tiu de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds disponiganta konvenajn ejojn kaj fakajn servojn.

b) Kaj tiu de aro da helpemuloj, kies kontribuo fakte multifacetas :

- regula surloka laborado de fakiĝintaj bonvolaj kunlaborantoj, kiuj venadas proprakoste kelkfoje el foraj lokoj por plenumadi sian funkcion.
- donaco de libroj, kongres-dokumentoj, bultenoj kaj periodaĵoj, ktp. cele al la kompletigo de la kolektoj de CDELI.
- kaj mon-kontribuoj. Fakte se trideko da kontribuantoj ordonus al sia banko la ĉiumonatan verŝon de po Fr 30.- al la Amikaro de CDELI, tiam la salajrado de la bibliotekistino de CDELI povus efektiviĝi kun malpli da zorgoj al la certe malavara arkivisto de CDELI.

Jen nia espero por la jaro 2013 ! Claude Gacond kaj ties kunlaborantaro.



# Kongresen

## Ekspozicio pri interlingvistiko en Munkeno



Reinhard Haupenthal preleganta

En la ŝtata biblioteko de Bavario, en Munkeno, oficiale malfermiĝis ekspozicio pri planlingvoj, aparte pri Volapük kaj Esperanto. La inaŭguradon mi ne ĉeestis,

sed aperis libro germanlingva kun la tekstoj de la prelegoj tiuokaze faritaj. La titolo de la libro estas *Zwischen Utopie und Wirklichkeit. Konstruierte Sprachen für die globalisierte Welt*. Ĝi enhavas la prelegojn prezentitajn dum la malferma ceremonio. Rolf Griebel prezentas la celon de la ekspozicio, Reinhard Haupenthal alfrontas la demandon *Kio estas interlingvistiko, kaj kial oni praktikas ĝin*, Gerhard F. Strasser proponas interesan trarigardon pri la frua fazo de la planlingvoj en la 17-a jarcento, Reinhardt Haupenthal priskribas la vivon de Schleyer kaj la lingvon Volapük, Ulrich Lins klarigas aspektojn de la unuaj 100 vivjaroj de Esperanto, Heiner Eicher priskribas la ne ĉiam klarajn rilatojn inter lingvistiko kaj planlingvistiko, kaj fine Herbert Mayer skribas pri la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Tre altiraj estas la bildoj, kiuj ilustras la libron.

Tiu ekspozicio naskiĝis paralele al donaco, fare de Reinhard kaj Irmi Haupenthal, de ilia grandega interlingvistika materialkolekto. Tute certe unu el la plej interesaj kaj multifacetaj, kiuj troviĝas ĉe privatulo.

La ekspozicio proponas tekstojn, bildojn kaj objektojn, nome revuojn, librojn, materialon pri Esperanto, pri Volapük, kaj pri pra-planlingvoj, kiuj troviĝas ĉe la biblioteko mem aŭ ĝin atingis lastatempe.

Ni admiris rarajn verkojn : la plej malnovaj estas de la 17-a jarcento. Interesa afero estas la ĉeesto de esperantistaj munkenanoj, kiuj helpis eventualajn vizitantojn bone kompreni la temon. De tempo al tempo, ili animas ankaŭ pli detalajn prezentojn kaj prelegojn pritemajn.

Bedaŭrinde tiu ekspozicio fermiĝis jam la 9-an de septembro. Sed ĝi estas certe transportebla, kaj, eventuale, prezentebla ankaŭ aliloke.

Tazio Carlevaro

-oOo-

## **Esperantista Migrado Aŭtuna**

EMA 2011 kaj 2012

Nova sporteta aranĝo estiĝis : EMA, tio estas Esperantista Migrado Aŭtuna, organizita de la Germana Esperanto-Asocio. Jam dufoje fine de oktobro ĝi okazis ĉe la Rejno. La Celgrupo estas „junaj maljunuloj“ migremaj, kiuj kapablas marŝi ĉirkaŭ 15 km tage kun altodiferencoj de 200 aŭ 300 metroj. Oni survojas de la 10-a ĝis la 17-a horo kaj piknikas tagmeze, se ne iu trinkejo aperas tentante la migrantojn. Alveno okazas dimanĉe antaŭ la vespermanĝo, foriro vendrede post la matenmanĝo. Disponeblas do kvar plenaj tagoj por ekskursi kaj esperantumi.

La organizo estas en moŝtaj manoj. La prezidanto de la germana asocio mem, Rudolf Fischer, emerita profesoro, gvidas la projekton, subtenata de sia edzino kaj de Wolfgang Bohr. La paro Fischer estas migre-sperta, ambaŭ portas artan bastonon volvitan el ligno, kvazaŭ simbolo de potenco ! Kun griza barbo li aspektas vere kiel la bona paŝtisto, fojfoje humore elbuŝas melodion aŭ fajfetas.

En 2011 ni loĝis en bona hotelo en Kamp Bornhofen, sude de Koblenz, en 2012 ni gastis en CVJM-domo en Kaub, ambaŭfoje sufiĉe komforte. Partoprenis 20 – 25 personoj, plejmulte germanoj, kelkaj svisoj, malmultaj el aliaj landoj. Regis libereco kaj toleremo paroli Esperanton aŭ ne, sed plej ofte oni aŭdis nian lingvon.

Inter Bingen kaj Koblenz la tiel nomata Rheinsteig laŭlongas dekstraflanke la riveron. Kiu kredus - kiel mi - , ke agrablas ebena pado, tute eraras. Supreniroj kaj malsupreniroj alternas pro la valetoj, tra kiuj riveretoj kuras al la Rejno. En 2011 ni migris inter Boppard kaj Kaub, en 2012 ni daŭrigis ĝis Rüdeseheim, kie nepras trinki glason da vino en la konata Drosselgasse, kun virinoj kaj muziko, *bei Wein, Weib und Gesang*. La pado kondukas tra arbaroj kaj vinberejoj, ligas multajn kastelojn aŭ burgojn kiel Maus, Katz, Liebenstein, Sterrenberg, Rheinstein, jam la vortoj estas lirikaj.

Je malbona vetero la organizantoj modifas la programon. Spite ni dufoje marŝis kontraŭ pluvo kaj vento, sed ne perdis la bonhumoron. Interese kiel forta estas la grupa vivo.

Ne estis antaŭvidita vespera programo, ĉar la migrantoj lacas kaj post glaso da vino dormemas. Tamen ĉijare Petro Chrdle prezentis la librojn de sia eldonejo kaj komentis la verkojn de Karel Čapek. Alian vesperon Rudolf Fischer rakontis pri la aventura vojo de Jakobo kun lumbildoj. Kompare al tiu defio EMA estas bagatelo.

Kun emocio ni kantis en Esperanto sur la roko de Loreley la samnoman popolkanton de Silcher, kiun mi kantis jam dum la junaĝo. Ĝi vekas nostalgion kaj tuŝas la koron. Tiu momento estis unu el la kulminoj de la esperanta migrado. Ĉu vi deziras kanti la unuan strofon? Jen :

*„Ne scias mi, kial mi estas  
Malgaja en la kor’.  
Antikva fabelo restas  
Por ĉiam en mia memor’.  
Vespero jam ekmalheliĝas,  
Fluadas la Rejn’ en trankvil’,  
La supro de l’ monto lumiĝas  
En vespersuna bril’.*

Bruno Graf

-oOo-

# *Kulturaj paĝoj*

---

*Redaktas : Richard Schneller (rs), Rue Charles-Knapp 20, 2000 Neuchâtel,  
rischneller(ĉe)gmail.com.*

*Pri la enhavo kaj la stilo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.*

---

## **Impresoj kaj esploroj pri la romano *Kiel akvo de l' rivero* de Raymond Schwartz**

**(1a parto)**

*Prelego de **Christoph Klawe**  
dum la festado de la 125-a jariĝo  
de esperanto en CDELI  
(1-an de septembro 2012)*



Raymond Schwartz vivis ekde la 8a de aprilo 1894 ĝis la 14a de majo 1973. Oni tre bone konas kelkajn datojn el lia vivo kaj la historion de liaj publikaĵoj kaj aktivecoj.

### **Verkoj kaj vivo**

- 8. 4. 1894 : Naskiĝas en Metz, Loreno ; tiam oficiale Germana urbo (dulingvulo !).
- 1912 : Publikigas unuajn rimaĵojn en *Tutmonda Espero*.
- 1913 : Fondas la Esperanto-grupon « Amika Rondo » en Metz.
- 1914-1918: Partoprenas la 1-an mondmiliton ĉe la germana flanko kiel oficiro. Batalas ĉe la orienta fronto kaj garnizonas en la orientprusa urbo Allenstein.
- 1920 : Laboras kiel bankoficisto en Parizo. Ekde tiam gvidas Esperanto-kabareton « La Verda Kato » en Parizo.

- 1926 : Publikigas la versan verkon *Verdkata testamento*.
- 1928 : Publikigas la novelojn *Prozo ridetanta*.
- 1930 : Publikigas la romaneton *Anni kaj Montmartre* (Anni devenas de Allenstein).
- 1931 : Publikigas la poemaron *La stranga butiko*.
- 1932-1939 : Kabareto « La bolanta kaldrono ».
- 1933 : Ekde tiu jaro redaktas la monatan spritgazeton *La Pirato*.
- 1939-45 : Dum du monatoj duaranga kanonisto, nun en la franca armeo. Poste ree laboras por sia banko, parte en Marseille.
- 1949-56 : Kabareto « La Tri Koboldoj ».
- 1949 : Publikigas *La ĝoja podio*.
- 1962 : Unua eldono de *Kiel akvo de l' rivero* (Reeldonoj 1977, 1987, 1991).
- 1963/64 : Rolas en la esperantlingva krimalfilmo *Angoroj* de Jacques-Louis Mahé.
- 1971 : Publikigas ... *Kun siaspeca spico*, prozajn kaj versajn humoraĵojn, kaj *Vole... novele*.
14. 5. 1973 : Mortas, enterigita en la familia tombo en Moncheux, Loreno.

Aliflanke granda parto de lia privata vivo kaj biografio ĝis nun restas en la mallumo, fidindaj informoj ofte ne estas troveblaj. Ni scias, ke Raymond Schwartz estis edziĝinta kaj havis du gefilojn. La filino, Francine, ankoraŭ vivas kaj aktive partoprenas la Esperanto-movadon en Francio. Raymond Schwartz laŭdire pasigis siajn somerajn feriojn ofte en la hejma vilaĝo en Loreno. La gepatra domo en la vilaĝo Secourt ankoraŭ staras.

Kiam mi staris antaŭ la domo, mi nenie vidis afiŝitan ŝildeton kun la nomo de la nunaj enloĝantoj. Ĉu ili scias, kiu loĝis tie en pasintaj tempoj ?

La tombejo de la familio Schwartz troviĝas en la apuda urbeto Moncheux (vidu foton sur la sekva paĝo).

Do malgraŭ la fakto, ke Raymond Schwartz pasigis la plej grandan parton de sia vivo en Parizo, li neniam perdis la kontakton al Loreno kaj restis kore ligita al la regiono, el kiu li venis.

Loreno estas ankaŭ la regiono, en kiu la agado de la plej konata romano far Raymond Schwartz, *Kiel akvo de l' rivero*, komenciĝas.

La romano estis plurfoje reeldonita post la unua publikigo en la jaro 1962 (1977, 1987, 1991).

Ĝi tiel forte impresis min per siaj vivplenaj kaj viglaj priskriboj de lokoj kaj homoj, ke mi miris, ĉu ejoj aŭ personoj vere ekzistis kaj mi decidis esplori. Kio povus esti la grajno da vero meze de la fikcio ?

Se mi citos el la verko, mi en la sekvonto rilatos al la ankoraŭ facile havebla eldono de Edistudio el la jaro 1991.

Por fari miajn impresojn kaj esplorojn sufiĉe interesajn ankaŭ por tiuj el la legantaro, kiuj ne jam legis la romanon, mi provas resumi la enhavon de la pli ol 500 paĝoj tiel klare kiel eble sur nur 4 folioj.



*La gepatra domo en Secourt  
(Loreno).*



*La tombejo  
de la familio Schwartz.*

## ***Kiel akvo de l' rivero :*** **Enhavo – 1a parto**

1913:

Du francaj ĝendarmoj ĉasas krimulon en kamparana Loreno.

Alveninte al grava « strategia punkto », la pli maljuna el ili eksplikas la ĉirkaŭaĵon al sia kunulo.

Oni superrigardas la limregionon inter Francio kaj Germanio.

La ĝendarmoj rememoras, ke ĉi-tiutage okazos geedziĝfestoj en la proksima vilaĝo Autrecourt. Ili decidas daŭrigi siajn esplorojn tie kaj tiel partopreni la feston.

En Autrecourt, la filino de loka bienulo, s-ro Bertringer, iĝas edzino de veterinaro el pariza familio.

La familio Bertringer uzas malnovan kastelon kiel farmbienon.

La gaja festeno kulminas en kaj finiĝas per komuna konsumado de la fama lorena mirabelbrando.


Pierre Touchard, la juna frato de la freŝa edzo, kiu ĵus finis la lernejon, rakontas al siaj novaj parencoj pri siaj planoj pasigi iom da tempo en Berlino, kie li volas labori kiel instruanto de la franca.

Nova onklo invitas Pierre Touchard migri al Chanzy – vilaĝo, kiu jam troviĝas sur germana tereno. Migrante tien, en arbaro oni preterpasas interesan vidindaĵon, la « kverkon de la virgulino ».

Do aperas la « enigmo de la vilaĝoj ». Ĉu la vilaĝo Autrecourt, kie la familio Bertringer loĝas, vere ekzistas ? Aŭ pri kia vilaĝo la aŭtoro pensis, kiam li kreis « Autrecourt » ?

Se oni serĉas sur la mapo, oni vere trovas vilaĝon de la nomo Autrecourt en Loreno – sed en tute alia regiono, malproksime de la aliaj vilaĝoj, kiuj estas menciitaj en la romano. Kion ni scias pri la situo de la « Autrecourt » el *Kiel akvo de l' rivero* ?

## Loreno : la enigmo de la vilaĝoj



Paĝo 19:


« Senvorte ambaŭ preterrajdis hodiaŭ la < gravan strategian punkton > kaj alvenis al tiu loko, kie la vojo disforkiĝis. Sur ligna fosto unu montrilo signis dekstren:

Chenicourt 1 km  
Ajoncourt 4 km

La maldekstra brako indikis:  
Thézey 2 km  
Autrecourt 8 km.



Oni facile trovas Chenicourt, Ajoncourt kaj Thezey. La « grava strategia punkto » devas esti la altaĵo de 234 metroj. Sed kie troviĝas « Autrecourt » ? Nu, pri la « Chanzy » de la romano ni ekscias, ke ĝi estas la plej proksima urbo ĉe Secourt (kiu estas ties fervojstacio), kaj jam apartenas al Germanio. Inter « Chanzy » kaj « Autrecourt » estas situanta arbaro, en kiu troviĝas la « kverko de la virgulino ». Pri « Autrecourt » ni legas, ke ĝi estas situanta 8 km for de la « grava strategia punkto » kaj ĉiam restis sur franca tereno.



Se vi studas la maperon ĉi-supre vi notos la liman linion per + - + - +, kiu tranĉas ĝin en preskaŭ du duonojn. Tiu linio signifas la hodiaŭan limon inter la departementoj Meurthe-et-Moselle (oriente de ĝi) kaj Moselle (sur la alia flanko). Ekzakte tiu linio ekde la milito de 1870/71, en kiu Germanio « venkis », estis la limo inter Francio kaj Germanio ĝis la fino de la unua mondmilito (Esperantistoj bone scias, ke neniu povas vere « venki » en iu milito).

La vilaĝo plej proksime al Secourt, kiun lastan ni ankaŭ facile trovas sur la mapo, sendube estas Saily-Achatel. Se ni sekve supozas, ke Saily-Achatel sin kaŝas malantaŭ la « Chanzy » de la romano, por trovi « Autrecourt » ni devas serĉi vilaĝon, kiu estas disigita de Saily-Achatel per arbaro kaj troviĝas en la nuntempa departemento Meurthe-et-Moselle, kiu ĉiam restis franca tereno. Ĉu Phlin ? Certe ne, ĉar de Saily-Achatel oni povas atingi ĝin sen tramigri la arbaron. Ĉu Ressaincourt ? Ressaincourt vere estas disigita de Saily-Achatel per la arbaro, sed estas situanta ankoraŭ en la departemento Moselle, do ne plenumas la kriterion, ke la serĉata vilaĝo

ankaŭ post la milito de 1870/71 ĉiam restis sur franca teritorio. Restas kiel kandidato Mailly-sur-Seille !

« Chanzy » :

La plej proksima urbo ĉe Secourt (kiu estas ties fervojstacio).

Jam apartenas al Germanio.

Inter « Chanzy » kaj « Autrecourt » estas situanta arbaro, en kiu troviĝas la « kverko de la virgulino ».

« Autrecourt » :

8 km for de la « grava strategia punkto ».

Ĉiam restis sur franca tereno.

Por doni impreson de la tre kamparana regiono, mi faris foton ekde punkto plej proksime al la « grava strategia punkto », la altaĵo de 234 metroj, kiu mem hodiaŭ estas ĉirkaŭita per altaj arboj. Je la horizonto oni vidas Mailly-sur-Seille.



*Elrigardo de la « grava strategia punkto » (altaĵo 234 m).*

Se la teorio pravas, ke malantaŭ la « Autrecourt » de la romano sin kaŝas la vilaĝo Mailly-sur-Seille, devus esti trovebla la « kverko de la virgulino » ie en tiu arbaro inter la du vilaĝoj Mailly-sur-Seille kaj Saily-Achatel.

Kaj fakte, se oni pligrandigas la eltranĉon de la mapo kun la arbaro inter Mailly-sur-Seille kaj Saily-Achatel, sur la meza senarbejo oni povas klare legi « Le chêne à la vierge » – la kverko de la virgulino en la franca !



Pri tiu « kverko de la virgulino » ni legas en *Kiel akvo de l' rivero* :

Paĝo 78 :

« Rigardu tiun dikan kverkon », la onklo atentigis sian junan kunulon, « ĝi estas pli ol centjara. Ĝi staras ĝuste sur kuniĝpunkto de ambaŭ landoj... Oni nomas ĝin la Kverko de l' Virgulino. »... Pierre vidis starantan en niĉo, tranĉita profunde en la trunko, lignan statueton de la Dipatrino, krudtrajtan skulptaĵon, nelerte sed bonintence makulitan per buntaj koloroj. « Ĝi estas movebla », klarigis la onklo, « ... kaj ĝis hodiaŭ rondiras la legendo, ke tiu statueto venigas feliĉon super la vilaĝon, al kiu ĝi rigardas. Estas do memkompreneble, ke ĉiu preterpasanto... neniam forgesas turni la figuron al sia hejmo. Ni konformiĝu al la pia kutimo. » »

Fakte, oni povas reale vidi la « kuniĝpunkton de ambaŭ landoj » en la arbaro !

Sur la sekva foto, per la kovraĵo de la strato oni povas facile distingi la iaman landlimon, kiu hodiaŭ estas la limo inter la departementoj, kiel la limŝtono videbla maldekstre indikas. Dekstre de tiu strato troviĝas la senarbejo kun « Le chêne à la vierge ».



En tiu teritorio oni vere trovas kolonon, kiu estas kronita per statueto de Maria.



Koncerne tiun kolonon rondiras malnova legendo. Iam en la mezepoko, kavaliro el Mailly revenis de iu krucmilitiro. Trarajdante la arbaron, sub kverko aperis la sankta virgulino kaj instigis la kavaliron hastigi lian ĉevalon, ĉar lia edzino estus mortonta. En plej rapida galopo li sukcesis ĝustatempe atingi la ege malsanan edzinon kaj dece adiaŭi ŝin, sed sensavebla ŝi mortis. Pro dankemo, ke li almenaŭ rajtis revidi la

edzinon ankoraŭ vivantan, la kavaliro donacis monaĥejon en la arbaro ĉe Phlin.<sup>1</sup> Por rememorigi la lokon de la apero de la sankta virgulino, li starigis la kolonon.

Sed okulfrape tiu kolono de la « kverko de la virgulino » entute ne similas al la priskribo en la romano. Ŝajnas, ke « kverkoj de la virgulino » estas tipe franca fenomeno. Fakte ankaŭ malofte ekzistas kverkoj, kiuj estas konsekritaj al la dipatrino ekzemple en Germanio, sed normale ili entute ne estas tiel bele ornamitaj kiel la francaj.

Kial oni trovas la kutimon ornami kverkojn kaj konsekri ilin al Maria tiel florante en Francio estus bona elirpunkto por pliaj esploroj. Mi pensas, ke verŝajne la malnova religio de la keltoj, kiuj adoris diojn en la kverkoj, gravas en tiu rilato.



Belegaj francaj ekzemploj troviĝas interalie en Bretonio, sed eble la kverko de Viroflay ĉe Parizo estas la plej bela.

---

<sup>1</sup> Emmanuel d'Huart, *Le Chêne-à-la-Vierge : tradition des bords de la Seille, Austrasie*, 1840, p. 22-28. Ankaŭ citita ĉe [http://fr.wikipedia.org/wiki/Abbaye\\_de\\_Sainte-Marie-au-Bois#cite\\_ref-30](http://fr.wikipedia.org/wiki/Abbaye_de_Sainte-Marie-au-Bois#cite_ref-30).

## Mailly-sur-Seille (« Autrecourt »)



Mi ne povis klarigi, ĉu iam ekzistis bele ornamita arbo ie en la regiono ĉirkaŭ Mailly-sur-Seille, kiu nur hodiaŭ ne plu ekzistas. Eblas, ke Raymond Schwartz, kiu ja dum longaj jaroj vivis en Parizo, pensis pri la kverko en Viroflay kaj uzis la verkistan liberecon por transloki la bildon de tiu arbo en la lorenan pejzaĝon de la romano. Malgraŭ la baza supozo de miaj esploroj, ke malantaŭ la ejoj kaj figuroj de la romano povus esti kaŝitaj vere ekzistantaj lokoj kaj personoj, kiuj inspiris Raymond Schwartz, mi neniam forgesis, ke temas ja pri la agado de romano, kaj ne detala priskribo de nedubendaj faktoj.



Se nia teorio pravas, ke Mailly-sur-Seille estas la « Autrecourt » de la romano, devus esti trovebla malnova kastelo en la vilaĝo. Tion oni entute ne supozus en tiu tre kamparana regiono de Loreno.

Kiam mi vizitis la vilaĝon dimanĉe je unu el la lastaj belaj tagoj de ia malfrua somero, krom unu knabo, kiu fajfante saltis tra la stratoj, eĉ nur unu alian personon mi ne vidis ie.

Pri la kastelo de « Autrecourt » ni legas en la romano :

Paĝo 25 :

« Sed al ĉi tiuj urbanoj Bertringer parolos pri sia kastelo, pri kiu li estas pli fiero ol iam, ĉar antaŭ nur kelkaj monatoj iuj sinjoroj, apartenantaj al la Arkeologia Societo en Nancy, malkovris ĝian antikvaĵan aŭtentikecon kaj valoron. Aperis eĉ tuta artikolo en la dimanĉa aldono de la gazeto *Pays Lorrain*, kun fotografaĵo, sub kiu oni povis legi *Fortikaĵa loĝejo de la grandsinjoroj de Autrecourt, XVI-a jarcento...* Fako estas, ke tiuj vilaĝprincoj, nomataj < de Autrecourt >, malaperis. La kastelo restis... Ankaŭ la unuaj posedantoj, sendube nobeloj neriĉaj, vivis de la terkulturado. »

Mirinda fakto : vere troviĝas surprize granda kastelo en Mailly-sur-Seille !



La kastelo hodiaŭ estas privata posedaĵo, kiun vizitantoj ŝajne ne rajtas viziti. Mi sonorigis sonorilon de apuda domo por esplori, kiamaniere oni povus dece eniri, sed neniu respondis.

Bedaŭrinde mi ne trovis metodon, ie elegante suprengrimpi la muron por fari pli bonajn fotojn de la korto.

Vidalvide de la kastelo staras la preĝejo, la ejo de la geedziĝa ceremonio en la romano, kie petolemaj knaboj en gaja epizodo ekzemple interŝanĝas la ĉapelojn de la partoprenantoj ktp.



Francaj preĝejoj ja ofte estas fermitaj ekster la tempoj de diservoj, sed ĉi tie mi povis facile eniri. Ŝajne ekde longe neniu preĝis tie, la benkoj estis kovritaj per polvo. Fakte la atmosfero estis iomete timiga : la pordoj knaris en la vento, ĉirkaŭ mi skulpturoj de la sankta Georgo trapikante la drakon per lanco, kaj neniu sciis, kie mi estis – mi post mallonga tempo forlasis la lokon.





Do multaj argumentoj pledas por la fakto, ke Mailly-sur-Seille estis la modelo de « Autrecourt ». Sed eble la plej grava estas ne jam menciita.

Post prelego pri « Kiel akvo de l' rivero » en Vigy en la jaro 2002 Francine Schwartz, filino de la aŭtoro, invitis la preleginton, Ed Borsboom, la konatan estron de la Internacia Esperanto Instituto en Hago, kune kun ŝi viziti la hejman regionon de la familio Schwartz. Kaj okaze de vizito en Mailly-sur-Seille sinjorino Schwartz rakontis, ke ŝia patro pensis pri la kastelo de tiu vilaĝo, kiam li kreis la « Autrecourt » de la romano.

Nenie en Mailly-sur-Seille mi trovis atentigon, ke temas pri fama ejo de la mondliteraturo. Eble en la komunumo neniu, ankaŭ kaj speciale ne la hodiaŭa posedanto de la kastelo, scias ion pri ĝi... Ĉu tio estas plibonigenda ?

(Dua parto en la venonta numero de SES informas.)

## ***La infana raso de William Auld***

**(1-a parto)**

*Prelego de Dominique de Mestral  
dum la festado de la 125-a jariĝo  
de esperanto en CDELI*

*(1-an de septembro 2012)*



*La infana raso* de William Auld estas elstare sprita, vigla, interesa kaj belsona poemo.

Vi verŝajne jam scias, ke la skota poeto William Auld mem travivis la duan mondmiliton kiel piloto en la brita flugarmeo. Tuj poste li verkis tiun poemon, kiu konsistas el 25 ĉapitroj.

Mi nun preterlasos aliajn biografiajn faktojn, literaturajn influojn, recenzojn ktp, ĉar ili perrete facile troveblas.

*La infana raso* pritraktas ĉiujn homajn problemojn de nia ankoraŭ nematura, tro juna, memdetrua homaro, kiu ree kaj ree forgesas erarojn, miskomprenas faktojn, tabuojn, vane inventas kaj do plu manipulas, perfortas, turmentas, militas.

Jen la ĉefaj temoj :

- ĉu ni estas liberaj ?
- frateco kaj egaleco de la homoj
- religio kaj dio
- amo, seksaj rilatoj kaj tabuoj
- fido al aŭtoritatoj
- milito kaj atombomboj
- komunikmalfacilaĵoj inter generacioj
- politiko, mensogo, manipulado

**1** La unua ĉapitro ege bele kaj humurplene priskribas la unuecon de la homaro kaj resumas la tutan poemon. Jen la kelkaj unuaj versoj...

*Saluton, masonisto, mia prapatro Ruben,  
kiu dum tuta vivo grimpadis supren-suben,  
ĉizante sur preĝejoj gargojlojn kaj anĝelojn !*

*Kaj vin, ho posteulo de Ruben, kiu velojn  
de karavelo hisis kaj sur la mar' piratis  
kaj la filinon duan de tavernisto svatis  
kaj lasis ŝin graveda kaj malaperis tute  
sur marofundon — kara, mi kantas vin salute !  
(Kaj ankaŭ vin aparte, ho tavernistfilino,  
avino mia praa, al kies mola sino  
sin premis tiu filo, kiu en posta vivo  
dediĉis sin al rabo, al murdo kaj lascivo,  
kaj dek bastardojn patris, el kiuj unu iris  
milite al Polujo, kaj tie vaste viris, al  
sia semofluo malfermis larĝe kluzojn,  
al mi testamentante milope polajn kuzojn !)*

**1** Ĉu ni ĉiuj estas fratoj ?

Ni ĉiuj – ĉu senmonaj, nekonataj, ĉu famaj, riĉaj, povohavaj – naskiĝis per seksumado kaj antaŭ nelonge ni ĉiuj spiris per blankoj, do fakte estis fiŝoj !

Krom tio li ĉi tie sprite primokas la homojn, kiuj plej ofte pentris Jesuon blankhaŭtan kaj bluokulan, dum li certe estis brunhaŭta arabo.

*Saluton, frato, kiu kolportas sur la stratoj —  
nin ia malproksima orgasmo faris fratoj !  
Kaj vi, juĝist' severa — saluton do, amiko !  
Nin ambaŭ kreis iam la sama ingvenotiko !  
Venu en miajn brakojn frate, nigrulo-plebo :  
disigis nin praprae duiĝo de amebo,  
kaj vi Jesuo Kristo, el lando brule suna,*

*vi estas mia frato malgraŭ la haŭto bruna  
kiun adeptoj viaj miscele kalkas blanka :  
antaŭnelonge nia prapatro estis blanka !*

- 2 Ĉu religiaj promesoj solvas la problemojn ? Kio estas l' animo ?  
Jen klaraj respondoj !

*Ĉu Dispirit' ekzistas ? Ne ekzistas ?  
Negrave. Sorto de l' homaro tristas.  
Tiu malhelpas solvon de l' problemoj,  
kiuj pri ia posta mond' insistas.*

*Tiom da parolaĉoj pri « l' animo » !  
Dume la korpon trafas malestimo ;  
kaj per tabuoj seksaj oni baras  
al la animo vojon al sublimo:*

[...]

*« L' animo » estas karna ! Nur fizike  
ĝi povas montri sin : muskolotike.  
Ekster la sensokvin' ĝi ne ekzistas,  
kaj ĝin prediki estas mistifike.*

[...]

*« L' animo » estas pens' kaj emocio :  
cerbo kaj glandoj. Sen la korp' : nenio.  
La raso estas juna : ĝi konstruos  
teran ĉielon — post la mort' de Dio.*

- 3 Pri nasko kaj rilatoj inter patrino kaj filo.

Auld pensas ke fiŝoj pli saĝas ol ni !

*Ĉeneron vian estis vi forĝinta,  
via unika rolo plenumiĝis.*

*Kaj tamen, tamen, tio ne sufiĉis –  
mi scias : – en revemo homa, blinda,  
al la futur' la idon vi dediĉis.*

*Ho panjo, estis stulte, estis vane !  
Kun tranĉo de la ŝnuro umbilika  
rompiĝis nia unuec' mistika ;  
kial pri mi vi revojn teksis plane ?  
Vi sciis ja : mi estos hom' komplika.*

*Fiŝoj pli saĝe faras. Metas ovojn*

*milope la patrino kaj fornaĝas  
sen plua penso. Kiel fiŝoj saĝas !  
Se povus ni deĵeti niajn kovojn !  
Pro kio, kriste ! ni evoluaĉas ?*

Kaj ree pri la patrino :

*Eĉ vi ekzistas kvazaŭ sur Venuso.  
Ni estas fremdaj, kvankam plej proksimaj.  
Kion vi scias, kara, pri l' intimaj  
sentoj de mia viva flus-malfluso ?  
Aŭ mi pri viaj pensoj senesprimaj ?*

4 Jen amuza ĉapitro pri politikistoj, militistoj, ekleziaj mensogoj kaj manipulado.  
Auld tordadas la vortojn, kreas vortludojn :

- generaloj iĝas gonoraloj (aludo al iu seksa malsano)
  - politikistoj iĝas minacantaj polatakistoj
  - parlamento – teda purlamento
  - armeo iĝas larmejo
  - pastroj – pestroj (pli danĝeraj ol epidemia malsano).
- Ili povas esti ĉu kakolekaj pratustintaj aŭ hebruaj kaj ĉiam verofintaj.

*Laŭ gonoraloj, la milit' necesas –  
nu, kunpremeble, ĉar per ĝi inspezas  
tiaj fraponoj, kaj hakiras gloron ;  
dum ve kaj mi ekiras nur doloron,  
aspuras la soldat' per murdo laŭron.  
Polatakistoj fiaflanke vokas,  
durante, ke la tuta mendo mokas  
nian nocion kaj ĝin ne rasplektas  
kaj nur larmejo brava nin protektas :  
kanonoj, bomboj kaj fuŝiloj baras  
la malumikon, kiu akuparas.*

5 Pri la seksa flanko de la homa vivo, kaj pri fideleco.  
Kaj Auld asertas : Ni ne estas liberaj, ni simple nevole nekonscie plenumas la  
celon (vastiĝon de la raso).

*akceptu min en vian liton  
la celon ni plenumos*

*la celo nin konsumos*

[...]

*se l' vivo nin insidas  
l' insidon ni ne vidas  
(tra l' pord' de via groto  
penetri ĝis la skroto)*

*kanto ! vin oni nomos erotika  
la vero estas iom pli komplika :*

[...]

*milmilion' da spermoj  
por krei unu homon milmilion' da homoj  
por krei unu Homon*

*(« virinoj naskas en doloro  
idmilionojn sen valoro »)*

Kaj pri fideleco :

*mi volus mian manon en obskuro  
meti sur firman karnon de femuro  
– sed de femuro via !*

[...]

*kial vi sola min stimulas, kara ?  
kial nur vian korpon mi karesus ?  
la mond' plenplenas de virinoj pretaj...  
nur vin sopiras mia tuta mio,  
al vi ĝi streĉas sin en muta vano !*

*pro kiso mia  
malfermu al peniso mia :  
la celon ni plenumas*

*la celo nin konsumas*

- 6** Kritiko de la eklezia aŭtoritato.  
Laŭ Auld la ekleziaj aŭtoritatuloj estas nigraj termitoj, traboza bando (laŭ la biblio, homoj kiuj emas vidi etan pajleron en alies okulo, sed ne la trabon en la propra okulo). La eklezia instruado misefikas sur la antikva moro (amorado). Auld asertas, ke ni nepre limigu tiun eklezian potencon !

*Kaj sur la belon ĉi termitoj nigraj*

*Kakas, kaj ĉirkaŭ miron volvas muron  
De kotobrikoj. Vilaj brakoj ograĵ  
Sklave policas la antikvan moron,  
Manipolataj de l' skeletaj ostoj  
De pompa pio.*

[...]

*Neniu pland' dispremos la termitan  
Potencon tute, sed limigo eblas ;  
Kaj la fantomajn saŭrojn en la mitan  
Kavernon libri certe ni kapablas.*

Kaj pri la aĉa influo de religiaj seksaj tabuoj sur la para vivo :

*Kiom da ĉagreno  
Nupta principas la traboza bando  
Je nomo de l' eterno*

7 La tempo forflugas !

*la akra molo de vespero  
en nokta klub', en Kermanŝah,  
forpasis kvazaŭ – nu, neĝero ? –  
kaj mi eĉ ne rimarkis. Ah !*

*kaj mi neniam estis juna  
– aŭ tro malfrue mi konstatas  
ke mia vivsituo nuna  
al ajna junco ne rilatas*

William Auld certe ne estas aparte optimista. Li estas ege realisma kaj honesta homo.

Nu kompreneble mi arbitre elektis ĉefe partojn de tiu poemo, kiuj min aparte koncernas aŭ tuŝas. Ankaŭ mi devis studi en katolika lernejo kaj certe pro tio emas malestimi la nigrajn termitojn kaj verofintajn pestojn ! Ankaŭ mi spertis kaj fakte plu spertas komunikmalfacilaĵojn kun miaj gepatroj ktp. Mi do, pli malpli vole kaj pro manko da tempo, preterlasis interesajn kaj belajn partojn de tiu elstara verko. *La infana raso* estas unika ĉefverko. Ĝi eĉ sendube estas sufiĉa kialo por lerni nian lingvon.

(Dua parto en la venonta numero de SES informas.)



# Svisa kalendaro

Ankaŭ vizitu la retan version de la kalendaro prizorgata de Luko Allemand

[www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro](http://www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro)

## Novembre

5 : Lausanne : LES-kunveno.  
17 : La Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.  
18 : Bern : Inaŭguro de la Ekspozicio pri Esperanto en la restoracio Take Away Esperato.  
23 : Basel : ESB-kunveno pri la programo 2013.

## Decembre

5 : Wil : EK-kunveno : Rakled-vespero.  
15 : Redakta datlimo de *SES-informas*.  
15 : La Chaux-de-Fonds : CDELI-Festa Studsabato.  
15 : Lausanne : Zamenhofa festo.

## Januare 2013

7 : Lausanne : LES-kunveno.  
26 : La Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

## Februare

4 : Lausanne : LES : Ĝenerala Asembleo.  
10 : Redakta datlimo de *SES-informas*.  
16 : La Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

## Marte

16 : La Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.  
23 : Staad (SG) : Ĝenerala Asembleo de SES en la restoracio « *Weisses Rössli* » sekvata de vizito de la *Markthalle* konstruita de Hundertwasser en Altenrhein.

## Aprile

20 : La Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

## Maje

25 : La Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

## Junie

15 : La Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

## Organizantoj de kursoj kaj stud-kunvenoj

**Basel : Esperanto-Societo Basel** : PF 178, 4005 Basel, tel : 0049 76 214 57 12.

**La Chaux-de-Fonds : CDELI**, Bibliothèque de la Ville, strato Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds. [claudEGAcond@ne.ch](mailto:claudEGAcond@ne.ch), tel : 032 967 68 42.

**CDELI-Studsabatoj** : Aliĝo ĝis la mardo antaŭ la koncerna studsabato ĉe Nancy Fontannaz : Rete: [nancy.fontannaz@gmail.com](mailto:nancy.fontannaz@gmail.com) tel : 021 728 31 27.

**Lausanne : Laŭzana Esperanto-Societo** : [esperanto@citycable.ch](mailto:esperanto@citycable.ch) tel : 021 647 29 28.

**Genève : Grupo La Stelo** : CP 734, 1212 Grand-Lancy 1. tel : 022 771 24 37.  
**kaj Asocio Esperanto-Genève-Régions** : [esperantoegr@gmail.com](mailto:esperantoegr@gmail.com)

**Wil : Esperanto-Klubo** : [wolfram@fischer-zim.ch](mailto:wolfram@fischer-zim.ch)

**Atentu ! *La Svisa Kalendaro* videblas aliflanke de tiu ĉi kovrila paĝo**

**La gelernantoj de La Granda Ursino  
skeĉe festantaj la 125an jaron de Esperanto.**



Fotoj de François Gacond



**Monika Molnar distribuinta diplomon al la ekzamen-sukcesintoj**